

Justinus Kerner,
 La plej riĉa princo
tradukita de Manfred Retzlaff

Siajn landojn laŭdegante
 |:De l' princaro konsili':²
 |:Sidis iam en la halo:|
 |:De l' germana imperi'::

”Ja belegas mia lando,“
 |:Jen la princo de Saksi':|
 |:”Multe da arĝenta erco:|
 |:En la montoj havas mi.“:

”Belas ankaŭ mia lando“,
 |:La Rejn-princo gloras sin.:|
 |:”Ora greno en la valoj:|
 |:Sur la montoj nobla vin“.:|

La sinjor' de Bavario
 |:Diris: ”Riĉas ankaŭ mi.:|
 |:Laŭ trezoroj estas riĉa:|
 |:Mia lando ne malpli.“:

Eberhardo, la barbulo,
 |:Virtemberga la sinjor',:|
 |:Diris: “Ja en mia lando:|
 |:Estas nek arĝent' nek or'.:|

Sed ĝi tamen estas riĉa,
 |:Trezoregon havas ĝi:|
 |:Ke al subularo mia:|
 |:Ja konfidi povas mi.“:

Diris la sinjor' Saksia,
 |:De l' Rejnland', de Bavari':|
 |:“Vi barbula graf', plej riĉa:|
 |:El ni ĉiuj estas vi!“:

...

Justinus Kerner,
 Der reichste Fürst

Preisend mit viel schönen Reden
 |:Ihrer Länder Wert und Zahl,|
 |:Saßen viele deutsche Fürsten:|
 |:Einst zu Worms im Kaisersaal:|

”Herrlich“, sprach der Fürst von Sachsen,
 |:”Ist mein Land und seine Macht;:|
 |:Silber hegen seine Berge:|
 |:Wohl in manchem tiefen Schacht.“:

”Seht mein Land in üpp'ger Fülle,“
 |:Sprach der Kurfürst von dem Rhein,|
 |:”Goldne Saaten in den Tälern,|
 |:Auf den Bergen edler Wein!“:

”Große Städte, reiche Klöster“,
 |:Ludwig, Herr zu Bayern, sprach,|
 |:Schaffen, dass mein Land den euren:|
 |:Wohl nicht steht an Schätzen nach.“:

Eberhard, der mit dem Barte,
 |:Württembergs geliebter Herr,|
 |:Sprach: ”Mein Land hat kleine Städte,|
 |:Trägt nicht Berge silberschwer;|

Doch ein Kleinod hält's verborgen;
 |:Dass in Wäldern, noch so groß,|
 |:Ich mein Haupt kann kühnlich legen:|
 |:Jedem Untertan in Schoß.“:

Und es rief der Herr von Sachsen,
 |:Der von Bayern, der vom Rhein:|
 |:“Graf im Bart! Ihr seid der Reichste!|
 |:Euer Land trägt Edelstein!“:

...

²aŭ:

:|La princara konsili':|

*Traduko de la Germana poemo “Der reichste Fürst” de JUSTINUS KERNER (*1786-09-18 – †1862-02-21) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-929-1864 (2013-10-09 18:59:42)

La poemo estas kantebla la jena melodio: http://www.politikundunterricht.de/2_3_01/M_hymnen.htm#fuerst. Tie ĝi estas ankaŭ aŭdebla. Ĝi estas la Virtemberga himno. La muzikantoj troviĝas ankaŭ en <http://www.volksliederarchiv.de/notenpdfs/1999.pdf>.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JUSTINUS KERNER (*1786-09-18 – †1862-02-21).*

Arg-929-1863 (2013-10-17 09:07:31)

Pri la poemo kaj la verkinto vidu la retejojn <http://ingeb.org/Lieder/preisend.html>, http://de.wikipedia.org/wiki/Preisend_mit_viel_schönen_Reden kaj <http://www.youtube.com/watch?v=eGGLN-zrTd0>. Ĝi estas kantebla laŭ la melodio de la germana popola kanto “In des Waldes tiefsten Gründen”, kiun verkis en 1799 Christian August Vulpius, la bopatro de J. W. v Goethe. Pri Chr. August Vulpius vidu la retejon http://www.lieder-archiv.de/texte/un-christian_august_vulpius-pid6662.html.